Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 29-500

NRO 1-2
4-a JARO
JANUARO-FEBRUARO 1949

EL LA ENHAVO:

AER en pli modesta amplekso
Per Esperanto por la olimpiado en 1952
Kiu kulpas?
La Esperanto-movado en Aŭstrio
Informoj de Laborista Esperantistaro
Katolika Esperanta Vivo
Bibliografio

LASTA INFORMO:

Radio-sendilo „Alpenland“ (Graz) disaŭdigas Esperanton. **Vidu paĝ. 14!**

AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo
de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
Abonprezo: Jarabono aŭstr. ŝil. 24.— aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

KORESPONDADO

Kiu volas korespondi kun en- kaj eksterlandaj geesperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de AER. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpaga. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 4,—. Ni petas, skribu bone legeble!

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkarto; PM = poŝtmarko.

Aŭstrio. — Gekursanoj el St. Pölten deziras korespondadon kun alilandaj gelernantoj. Skribu al: Esperanto-kurso en la maŝinfabriko Voith, St. Pölten. — S-ro Karl Suchy, Wels, Heimstättenring 45, kor. per il. PK kun ĉ. landoj. — S-ro Aŭgust Schlerka, Wien XV., Schuselkagasse 6/8 interŝ. il. PK kun ĉiuj landoj. — S-ro Karl Rametsteiner, tajloro, Linz, Stiftergasse 12, serĉas eksteri. korespondadon. — S-ino Flora Seligo, fakinstruistino, Salzburg-Aigen, Ernst Greinerstr. 6, kor. kun ges-anoj en tutmondo. — S-ro Hans Wollschlager, Großgmain 190 bei Salzburg, ĝardenisto, interŝ. il. PK, kor. kun tutmondo, resp. certe.

Bulgarujo. — K-do Najden Hristow, str. hristo Cernopeev 14, Blovdiv, interŝanĝas tabakon kontraŭ filmoj 6×9.

Cekoslovakujo. — S-ro Savo Kroupa, Cheb, Stalinova 40, kor. kun aŭstriaj kaj alilandaj ges-anoj per il. PK, interŝ. PM. — F-ino R. Makrlíková, Mimoň 142/I. u. Č. Lipy, 18 jara skoltino, dez. kor. kun Viena s-an(in)o, resp. garantiata.

Germanujo. — S-ro Walter Steinert, instruisto, Kirchberg i. Sa., Niedercrinitzerstr. 62, rusa zono, kor. pri ekonomiaj, kulturaj kaj sciencaj demandoj. — S-ro Kurt Elias, Leipzig W 35, Philipp Reisstr. 81, rusa zono, interŝ. PM., komercgazetojn kaj informas pri la Leipzig-a foiro kontraŭ resp. kup. — S-ro Heinz Grimm, Leipzig S 3, Waisenhausstr. 23, rusa zono, kor. pri muziko, literaturo, ŝakludo kaj interŝ. il PK kaj PM.

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

4-a jaro | JANUARO/FEBRUARO 1949 | n-ro 1—2

AER en pli modesta amplekso

Kiam ni en Aŭgusto 1946 eldonis la unuan numeron de nia revuo, eksterlandaj E-organizoj miris pri la — kiel ili skribis — luksa aspekto de la nova AEF-organo kaj nia celo tiam estis, ĝin eĉ pliboniĝi kaj pli ampleksigi. La movado prosperis kaj ni forte esperis kaj kredis, ke la ekonomia kaj politika situacio en Aŭstrio en relative baldaŭa tempo ŝanĝiĝos kaj la aliancanoj per subskribo de ŝtatkontrakto fakte donos al nia hejmlando la sopiratan liberon. Bedaŭrinde en tio ĉiuj aŭstrianoj profunde estas seniluziigitaj. Nia ŝtato ankoraŭ ĉiam ĝemas sub la okupado kaj ni sentas la malagrablajn efikojn de nia mallibereco en ĉiuj branĉoj de la ĉiutaga vivo.

Ankaŭ la E-movado ne restis netuŝita de tiu fakto. Ni ĉiuj bone memoras, kun kia entuziasmo en 1945 la homoj venis en la E-kursojn. Ili vere estis pretaj kredi, ke post forpaso de la milita spirito en relative baldaŭa tempo ree venos periodo de ŝtata libero, de demokrata evoluo kaj de bonaj rilatoj inter ĉiuj popoloj de la mondo. Ke tiuj esperoj bedaŭrinde ne plenumiĝis, ke la turmentita Eŭropo preskaŭ kvar jarojn post la militfino nun vivas en la stato de „malvarma milito", tion ni ne povis antaŭvidi kaj ni nun sentas la efikojn ankaŭ en la E-movado aŭstria kaj alilande. La varbado de novaj adeptoj por nia ideo tre malfaciliĝis pro la fakto, ke senĝenaj rilatoj inter la ŝtatoj kaj popoloj praktike ankoraŭ ne ekzistas, ke vojaĝoj de unu lando en la alian ĉie renkontas preskaŭ ne transireblajn barojn kaj reciprokaj vojaĝpermesoj nur sporade estas donataj. Tiamaniere do mankas la ekstera instigo lerni lingvon, kiu nuntempe pro la cititaj cirkonstancoj grandskale praktike ne estas aplikebla.

Tial la E-kursoj de jaro al jaro estis ĉiam malpli frekventataj kaj pro tio ni povas apogi nian organizan laboron plejparte nur sur la nunan anaron, ĉar novaj membroj pro la skizitaj kialoj ne multaj aliĝas. Tio kompreneble respeguliĝas malfavore en la tutorganizo, kies financaj rimedoj konstante malpliiĝas, kvankam neniu funkciulo ricevas salajron por sia laboro.

Ke AEF sian organon tamen ĝis nun povis senkoste doni al siaj anoj en konsiderinda amplekso — pro kio alilandaj E-organizoj envias nian movadon — kaj krome eĉ aldoni al AER germanlingvan komplementon, ĝi nur povis fari tion pro ricevo de subvencioj de diversaj gravaj organizoj kaj aŭtoritataj instancoj. Per la nuraj enspezoj el la kotizoj de la anaro tio ne estus ebla pro la altaj eldonkostoj. Kiel ekzemplon ni citu nur, ke la preskostoj de la lasta numero de Aŭstria E-Revuo, numero 7—9/1948 sola estis ŝil. 1 500, ne enkalkulite la paperkostoj, kio multe superas la buĝeton de la organizo. Kaj pro la ĝenerala multekosteco ankaŭ subvencioj ne plu estas haveblaj, ĉar la respektivaj donacintoj nun pli ŝparas sian monon.

Tial la estraro de AEF post funda ekzameno de la supozeblaj enspezoj el la kotizoj devis decidi malpliigi la amplekson de AER por ŝpari preskostojn kaj provizore ne plu eldoni la germanlingvan komplementon ĝis eventuale la financaj rimedoj de la organizo pliboniĝos.

Tamen, tiu ĉi bedaŭrinda aranĝo ne malkuraĝigu nin en la persista plulaborado por la E-movado, kiu spite al ĉiuj malfacilaĵoj per nia komuna agado atingis en Aŭstrio jam tiom da bonegaj sukcesoj kiel lastatempe la kreon de E-lektorato ĉe la universitato de Innsbruck. Restu ni fidelaj al la E-movado kaj nia ideo ankaŭ en periodo malfavora, apogu ni ĉiuforte nian komunan organizon per regula kaj ĝustatempa pago de la kotizoj kaj kunlaboru ni ĉie, kie nia helpo estas bezonata. Tiam ni certe komune venkos la nunan krizon kaj tiamaniere ni preparas la kampon por novaj estontaj sukcesoj, precipe por la alcelata enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kiam la aliancanoj fine forlasos nian landon kaj Aŭstrio denove fariĝos ŝtato vere libera kaj respubliko suverena.

La redakcio.

Biografieto de nia prezidanto

En la landa kongreso de Linz 1948 ni havis la ĝojon, ke eksministro kaj viceprezidanto de la Supera ŝtata revizejo (Kalkulkortumo) s-ano d-ro Hans F r e n z e l deklaris sin preta transpreni la funkcion de prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio.

D-ro H. Frenzel naskiĝis en la jaro 1895 en Herzogenburg proksime al St. Pölten kiel filo de la tiea fervoja staciestro. Post la lernejaj studoj kaj soldata servo li oficis ĉe la magistrato de la urbo Linz. Sed krom sia oficio li daŭrigis energie la studadon kaj akiris en 1932 ĉe la universitato Innsbruck la akademian gradon de doktoro de juro.

Tamen s-ano Frenzel per sia studsukceso ne estis kontenta kaj krome okupiĝis pri mikroskopio kaj kreviga tekniko kaj fariĝis en tiu scienco fakulo, kies bonfamo estis konata eĉ ekster la limoj de Aŭstrio.

Kiam la germanaj faŝistoj en 1938 perforte okupis Aŭstrion, krom multaj aliaj eminentaj viroj de sia hejmlando ankaŭ s-ano d-ro Frenzel estis arestita de la malbonfama Gestapo kaj pli poste li estis maldungita el sia ofico sen pensio.

Despli ni ĝojas, ke s-ano d-ro Frenzel, kiu jam en 1920 lernis Esperanton, nun akceptis la plej altan funkcion en nia federacio esperantista. Ni sincere esperu, ke li per nia komuna kunhelpo sukcesos gvidi ĝin tra la nuna kriza periodo pro la internacia politika dissplitiĝo en pli bonan kaj prosperigan estonton.

Per Esperanto por la olimpiado en 1952!

En la jaro 1952 la olimpiado okazos en Finnlando. Tiun olimpiadon versâjne partoprenos, la unuan fojon, Sovetunio kaj certe Germanujo kaj Japanlando. Do, tio estos vera olimpiado, kiun partoprenos ĉiuj popoloj de la tero.

Nur unu ilo mankos: la komuna lingvo.

Estus tre bone, se ankaŭ la universala mondkongreso de Esperanto okazus en Finnlando en 1952. Ĝi povus okazi en la proksimeco de Helsinki, kie okazos la olimpiado aŭ en Turku aŭ en Hangö aŭ en Helsinki mem, sed la universala mondkongreso de Esperanto devus okazi nepre a n t a ŭ la olimpiado.

La partoprenontoj de la mondkongreso povos ĉeesti alian mondokazontaĵon: la olimpiadon.

La radiolaŭtparoliloj eksonos ankaŭ en Esperanto sur la sportarenoj. La junularo de la mondo ekaŭdos, eble la unuan fojon, nian lingvon kaj miloj da homoj kun la verda stelo faros propagandon por la mondsporto kaj mondolingvo.

Sporto kaj Esperanto estas simboloj de la eterna paco!

La ĉiulandaj sportistoj kaj ĵurnalistoj hejmeniros kaj rakontos pri la granda festo de la paco kaj de la interkompreno.

La olimpiado en 1952 estas grandega ŝanco por Esperanto kaj Finnlando estas l a taŭga lando por efektivigi nian ideon. La finnoj bonege povos organizi kaj prepari ĉi tiun aferon.

Kiel opinias la samideanoj pri mia ideo?

Esperantistoj! Ĉio dependas de la metodo kaj de la organizo. Organizu, propagandu mian ideon. Ne nur la finnoj devas organizi ĉi tiun planon, sed ĉiulandaj esperantistoj. Do, ekagu, tuj!

Anton Konecny, Vieno.

Kiu kulpas?

„Spät kommt ihr, doch ihr kommt." (Malfrue vi venas, tamen vi venas.) Tiuj ĉi vortoj de Schiller ĉiam sonas en miaj oreloj, kiam mi legas nuntempe la diversajn artikolojn en gazetoj pri Paneŭropo. Efektive nun, iom post iom oni ekkomprenas la nepran neceson, ke la diversaj nacioj kaj ŝtatoj de l'kontinento interkonsentu kaj unuiĝu. Sanaj pensoj, kial vi venas tiom malfrue? Ĉu oni ne estus povinta eviti la terurajn katastrofojn de la lastaj jaroj? Kiu kulpas? Jen tre trafaj vortoj skribitaj en la Wiener Tageszeitung (5. 5. 1948):

> „La penso Eŭropo estis proksima post la unua mondmilito, devis veni la dua mondmilito por maturigi ĝin, devis veni la malvarma milito, por igi ĝin praktike pensebla."

Efektive, baldaŭ post la unua mondmilito Paneŭropo-Unio de Coudenhove-Kalergi estis fondita kaj viroj kun vasta spirita horizonto gvidis la agadon. Dr. Seipel en Aŭstrio, Stresemann en Germanio, Briand en Francujo. Kelkmil da homoj aniĝis al tiu ĉi movado, kiuj ekkomprenis la postulojn de sia tempo. Sed kion ĝi utilis? Nur kelkmil da homoj komprenis, kvankam inter ili eminentuloj, ili tamen ne estis kapablaj sukcesi. La granda homamaso estas ja tro regata de l'naturleĝa inerteco, jen kiu kulpas pri la katastrofoj. La faŝismo, la naciismo, alia ismo ne estas la radikoj de la malfeliĉoj, sed ili estas la venenaj plantoj kreskantaj sur fundo malbona, nome la eraranta homaro kaj la cirkonstancoj anakronismaj.

Ĉio en la mondo trovigas kvazaŭ en ĉiama fluado, la tuta mondo evoluas konstante, nenio haltas, kompreneble ankaŭ la homa kulturo ne restas senmova. Oni konsideru la mirindan evoluon rilate komunikado, trafiko k. t. p., la interrilatoj inter la popoloj rapide densiĝis dum la lastaj jaroj, sed la landlimoj restis longtempe preskaŭ senmovaj kaj iĝis malhelpantaj bariloj. La tuta Eŭropo jam aspektis kiel disŝirita teritorio laŭ ŝtata, ekonomia kaj lingva vidpunktoj. La homa prudento ne sufiĉis por forigi tiujn tedajn barilojn. Do la natura evoluado nehaltigebla perforte krevigas la barilojn per granda bruo kaŭzante grandan doloron al la homaro. Bedaŭrinda homaro, nenio naskiĝas sen doloroj!

Jen la urĝaj postuloj de nia nuna tempo: Forigi la politikajn kaj ekonomiajn barilojn per Paneŭropo, forigi la lingvajn barilojn per Esperanto.

Oskar Sinner.

Finleginte la revuon, sendu ĝin al via eksterlanda amiko

Severega averto

Terurigite mi legis, ke ekzistas provoj por anstataŭigi la literojn kun supersignoj per novaj literoj. Ĉiu prudenta esperantisto sendube ekkonas, ke ne ĉiu unuopulo aŭ teoriulo rajtas plibonigi la lingvon laŭ sia bontrovo. Tiajn aliigojn oni nur tiam faru, se ili nepre estas necesaj kaj antaŭ ĉio tiaj ŝanĝoj devus esti submetataj al la funda esploro kaj decido de la Lingva Komitato (mi esperas, ke tiu ankoraŭ ekzistas kaj funkcias!). Bedaŭrinde oni preskaŭ nenion plu aŭdas aŭ legas pri ĝiaj laboroj.

Esperanto dankas sian evoluadon sole al la severega disciplino de sia ĝisnuna adeptaro. Laŭ mia opinio tute ne necesas pro la supersigna demando movigi la Esperantistaron tutmonde nur pro tio, ĉar diversaj presejoj provizore ankoraŭ ne disponas pri presskriboj kun sufiĉe da supersignitaj literoj.

Kiel multaj aliaj militaj domaĝoj ankaŭ tiu bedaŭrinda fakto kun la tempo malaperos kaj la presejoj certe havigos al si la diversajn presskribojn kun la necesaj supersignoj. Se la ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj en tutmondo tri jarojn post la militfino ne estus tiel nenormalaj, tio certe jam de longe estus okazinta. Kaj en la plej necesaj okazoj oni agu laŭ la fundamenta konsilo kaj anstataŭu la mankantajn supersignojn provizore per la litero h.

Robert Schilling.

ESPERANTO-MONDO en Aŭstrio

3. Aŭstria Esperanto-Kongreso okazos la 16.—20. Julio 1949 en Graz.

Unua komuniko.

Kongresejo: Mahagoni-salonego de la Laborista ĉambro en Graz.

Kongreskotzo: ŝil. 10,—, por familianoj po ŝil. 5,—.

En la kadro de la kongreso okazos: ĉefkunveno de Societo de Amikoj al Esperanto fakkunsidoj, Di-servoj, paroladoj kaj prelegoj, amuzvespero, Esperanto-balo k. s.

La detala programo estos publikigata en la sekvonta numero de AER.

La grupoj estas petataj jam nun ĉiuloke varbi por la partopreno al la 3-a kongreso en Graz, por ke ĝi fariĝu same impona manifestacio de la aŭstria Esperanto-movado kiel en Kufstein kaj Linz.

La estraro de AEF.

Aŭstria Popola Partio por Esperanto

El Aŭstrio ni denove povas komuniki gravegajn sukcesojn.

La deklaracio pri Esperanto por la peticio de UEA al UNO estas subskribita oficiale de la Aŭstria Popola Partio. La partio nombras 650.000 mem-

broĵn. Nome de la centra partiestraro subskribis la partiprezidanto, s-ro Federacia kanceliero d-ro inĝ. L. Figl kaj la ĝenerala sekretario s-ro Federacia ministro por instruo dro F. Hurdes.

Aŭstria ĉefministro subtenas Esperanton

S-ro Federacia kanceliero d-ro inĝ. L. Figl persone subskribis la deklaracion pri Esperanto por la peticio al UNO.

Aŭstria instruministro favoras Esperanton

S-ro Federacia ministro por instruo d-ro F. Hurdes persone subskribis la deklaracion al UNO pri enkonduko de Esperanto.

La esperantistaro aŭstria ĝojegas pri la supre nomitaj oficialaj subskriboj kaj dankas al la Popola Partio, al s-ro Federacia kanceliero d-ro inĝ. L. Figl kaj al s-ro Federacia ministro d-ro F. Hurdes pro ilia morala subteno, kiun ili donis al la ideo pri enkonduko de lingvo internacia. Tio denove pruvas, ke Aŭstrio, kvankam estante ŝtato nur malgranda, sur la kampo kultura montriĝis kaj montriĝas progresema.

Viena Esperanto-Tago

aranĝita de la Viena E-Delegitaro (VED) okazis la 9. 10. 1948 en la sindikata salonego, XV., Markgraf-Rüdigerstraße 4.

Prezidanto de VED, s-ano Vokal je la 15a h. malfermis la kunvenon, salutis la ĉ. 200 partoprenantoĵn kaj senkulpigis la foreston pro grava malhelpo de s-anoj eksministro d-ro Frenzel, ĝen. poŝtdirektoro d-ro Dvorschak kaj direktoro Glüxmann. Afergvidanto s-ano Cech konigis la alsendon de salutleteroj al la Federacia kanceliero d-ro inĝ. Figl, urbestro generalo d-ro Körner, ministro d-ro Hurdes, ĝen. poŝtdirektoro d-ro Dvorschak, prezidanto de AEF d-ro Frenzel kaj urbkonsilanto d-ro Matejka. (Aplaŭde apceptite.)

Prezidanto Vokal nekrologe parolis pri la mortintaj ges-anoj: Chiba Leopold, honora prez. de AKLE, Lochner Andreo (Danubio), Reithofer (Hainburg), Tremmel (Wien) kaj Juli Tojoda (Tokio), kiu dum la jaroj 1936—1938 vivis en Vieno. La ĉeestantoj starante honoris la memoron de niaj forpasintaj ges-anoj.

Poste parolis s-ano Mudrak pri la Universala Kongreso en Malmö, skizis la plej gravaĵn spertoĵn kaj decidoĵn de la kongreso kaj esprimis la dankon al la gastama Svedlando.

S-ano Sager raportis pri la laboroj de la SAT-kongreso en Amsterdam, kiun partopreni al la aŭstriaj SAT-anoj ne estis permesite pro nericevo de la envojaĝpermeso flanke de la nederlanda registaro.

Sekvis raporto de s-ano Vokal pri la 2a Aŭstria E-Konkreso en Linz, bone preparita de la EKK sub la gvidado de estro K. Nigl. Li memorigis la salutparoladon de la landestro de Supra Aŭstrio d-ro H. Gleissner, Honorprezidanto de la kongreso, dum kies parolado oni havis la impreson kvazaŭ parolus samideano. La parolanto koncize skizis la praktikaĵn laboroĵn de la fakkunsidoj, parolis pri la ĝenerala kunveno de la Societo de Amikoj al Esperanto, pri la aranĝo de la diservo kun prediko de la jam vaste konata pastro Kaps kaj citis ekzemple la modelan laboron de la AEF-landestro de Tirol, s-ano Hans Steiner kaj akcentis, ke ankaŭ la aliaj landestroj laŭcirkonstance vigle agadas. S-ano Vokal menciis ankaŭ la paroladoĵn gravaĵn de la s-anoj sekcia konsilanto d-ro Führing, universitata prof. d-ro Hugo Sirk kaj de la famkonata lingvisto d-ro Eugen Wüster.

D-ro L. Grimme, viceprezidanto de AEF referis pri la Danubregiona Konferenco en Budapest. Entute estis reprezentataj 7 ŝtatoj kaj la traktadoj okazis en objektiva kaj afabla atmosfero. Li konigis la proponoĵn kaj rezoluciojn de la konferenco kaj esprimis la esperon, ke tiu Danubregiona Konferenco estu elirpunkto por estonta pli intima kunlaboro inter la respektivaj landoj. Krome d-ro Grimme menciis la grandan gastamon de la hungaroj kaj la kvazaŭ pompaĵn aranĝoĵn.

Sekvis paroladoj de ges-anoj Feichtinger (AKLE) kaj Bouche. Poste parolis redaktoro G. Katzianka pri la Esperanto-Tago en Schlaining, Bgld. kaj pri novaj metodoj en la propagando por Esperanto.

Afergvidanto s-ano Cech raportis pri diversaj aranĝoj, projektoj kaj novaj taskoj en la Esperanto-movado.

Fine dankis estro Vokal al ĉiuj referintoj pro iliaj paroladoj, konigis la vesperan amuzan parton, la sekvontan dimanĉan ekskursprogramon al Sophienalpe kaj fermis la kunvenon per instigaj vortoj.

Instruistoj esperantistaj!

Dum la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Linz okazis fakkunsido de la instruistoj, al kiu partoprenis 22 gekolegoj. Oni decidis fondi en la kadro de AEF apartan sekcion instruistan kaj elektis min estro. Mi tiam petis ĉiujn ĉeestantojn sendi al mi poŝtkarton kun jenaj datoj: nomo, naskiĝdato, titolo, adreso, ĉu ŝtatan ekzamenon instrurajtigan aŭ kapablecan. Bedaŭrinde ne venis anoncoj. Tial, karaj gekolegoj, mi alvokas vin pri tuja anonco. La celo de la sekcio instruista estas kolekti ĉiujn geinstruistojn esperantistajn por komuna laboro celkoncia, por atingi la fincelon: Esperanton en la lernejojn!

Ne timu novan kotizon! Restu membro de via grupo, al kiu vi nun apartenas kaj pagu tie vian kotizon. Ni ne bezonas vian monon, sed vian kunlaboron. Ni aperigos en Aŭstria Esperanto-Revuo „Angulon por instruistoj", kiun mi estas preta redakti. Por ke mi povu plenumi tiun ĉi taskon, mi petas vian kunlaboron. Bonvolu sendi al mi taŭgajn informojn rilate al Esperanto kaj instruistaj aferoj. Klopodu gvidi E-kursojn en via lernejo, en la kadro de via societo aŭ en loka popolaltlernejo, kaj raportu pri viaj sukcesoj aŭ malsukcesoj. Preparu vin por la ŝtata ekzameno kaj instigu viajn gekolegojn studi Esperanton. Pripensu, ke la venko dependas de nia laboro, ankaŭ de via laboro.

Fine mi volas esprimi mian dankon pro bonega laboro al la gekolegoj Lisl Oberlechner en Saalfelden, Georg Loczi en Böckstein kaj d-ro Anton Karner en Innsbruck. Mi esperas baldaŭ povi raporti ankaŭ pri sukcesoj de aliaj gekolegoj.

Franz Fötinger,
Salzburg, Kasernengasse 5.

Internacia fervojista renkontiĝo en Wien

okazos la 2. kaj 3. de Aprilo 1949; kiun partoprenos fervojistaj esperantistoj el multaj landoj. Vienaj geesperantistoj estas alvokataj gastigi ĉe si eksterlandan gaston por pruvi la Vienan gastamon. Esperantistoj, kiuj intencas partopreni en Aŭgusto la SAT-Kongreson en Parizo, havas la eblecon akcepti francan s-anon, kiu poste gastigos Vienan s-anon en Parizo.

Anoncu t u j vian adreson por la interŝanĝo al la E-Centro, Wien I., Neutorgasse 9. Specialajn dezirojn konigu.

Kortega konsilisto d-ro Franz Wollmann

malnova sukcesplena Esperantopioniro, kreinto de la Aŭstria ŝtata ekzamenkomisiono pri Esperanto, festis la 30. 10. 1948 kun sia ŝatata edzino la 50-jaran geedziĝfeston en sano kaj plena spirita freŝo.

La prezidanto de la Viena E-Delegitaro, s-ano Vokal, per telegramo esprimis al la altŝatata jubilea paro nome de la esperantistaro la plej korajn kaj sincerajn bondezirojn, pro kiuj s-ano d-ro Wollmann letere varme dankis al ĉiuj geesperantistoj.

Universitato de Innsbruck, Tirol,

instalis, kiel jam raportite, apartan E-lektoraton. Tio estas despli signifa, ĉar la universitato de Innsbruck estas la unua aŭstria universitato, kiu fondis lektoraton por Esperanto, kvankam tiaj lektoratoj jam depost jaroj ekzistas ĉe aliaj aŭstriaj altlernejoj. Ni dankas tiun gravan sukceson al la multaj klopodoj de s-ano d-ro Leo B l a a s kaj de la universitata prof. por hindo-germana lingvistiko (Innsbruck) s-ro d-ro Hermann A m m a n kaj nelaste al la s-ro la rektoro de la universitato mem. La nomitaj sinjoroj meritas la plenan agnoskon kaj dankon de la aŭstria, ja eĉ de la eksterlanda esperantistaro.

Ĉu necesas en tiu konekso ankaŭ mencii la nomon de nia senlaca s-ano Hans Steiner (Kirchbichl)? Ni ĉiuj bone scias, ke li estas la animo de la E-movado en Tirol kaj pro tio la kreado de la E-lektorato ĉe la universitato Innsbruck parte estas ankaŭ lia verko, pro kio ni ankaŭ dankas lin.

Esperantoekzamenoj ŝtataj

okazis en Decembro 1948 en Vieno. Du s-anoj faris la ekzamenon pri instrukapableco kaj kvin pri la lingvoscio. La sekvontaj ekzamenoj okazos printempe kaj ĉiuj seriozaj geesperantistoj estas alvokataj prepari sin por esti ŝtate ekzamenotaj.

Zamenhofa festo en Vieno

estis aranĝata de la Viena Esperanto-Deligitaro la 12. Dec. 1948 en la Popola Altlernejo, V., Stöberg. 11. La kvarteto „Harmonio" beligis la programon per artaj muzikaĵoj. Malfermis la feston estro de VED E. Vokal. Festparolis d-ro L. Grimme. S-ano St. Zodel majstre lautlegis „Vortojn al la Majstro", verkitajn de li mem. Direktoro P. Glüxmann parolis pri: La verko de pacamiko. S-anino Schamanek recitis poemojn. La bonege vizitata festo denove kunigis la Vienan esperantistaron por soleni la memoron al d-ro Zamenhof.

1-a Esperanto-Tago en Stirio

okazis en Graz la 2.—3. 10. 1948. Estro de la E-societo „Unueco", Graz, s-ano J. Eder malfermis kaj salutis la kunvenon, speciale la gastojn el multaj lokoj de Stirio kaj s-anon d-ro Hamwai (Budapest) kaj s-aninon Hamwai (Estonio).

Salutskribaĵoj alvenis de AEF-centro, Societo de Amikoj al Esperanto, E-grupo „Harmonio", Wien kaj de diversaj s-anoj. Poste prezentis la estro koncizan raporton pri la evoluo de la E-ideo en Strio:

La 16. 10. 1906 kunvenis unuafoje la E-pioniroj d-ro Rudolf Petera, prof. Otto Simon, Wien, magistro Gustav Teltschik, ŝuisto Franz Kaufmann kun edzino kaj pli poste aliĝis la grupeton la ankoraŭ nun aktiva s-ano Karl Bartel k. a. En 1913 la societo jam nombris 70 anojn. En Leoben fondiĝis grupo en 1913, pli poste la Akademia E-Societo Graz kaj la katolika E-societo „Emile Peltier". Pentekoste 1913 okazis en Graz la Aŭstria E-Kongreso. Post la militfino en 1918 la movado denove ekviviĝis ĝis la nazireĝimo en Aŭstrio ĝin malpermesis. Kiam nia patrujo en 1945 liberiĝis, la stiriaj esperantistoj tuj komencis rekonstrui la detruitan E-movadon kaj la 10. 5. 1947 fondiĝis la E-societo „Unueco" en Graz post venko de multaj malhelpoj. En diversaj aliaj lokoj ankaŭ jam ekzistas grupoj kaj grupetoj. „Unueco" nun nombras iom pli ol 60 anojn. Tamen multaj malnovaj s-anoj ankoraŭ staras ekster nia vico kaj ilin la movado devas denove gajni. Por la UNO-peticio en Stirio sola estis kolektataj 608.000 subskriboj. Multaj aliaj gravaj taskoj ankoraŭ estas plenumotaj kaj la nuntempe plej grava estas la preparo de la Aŭstria E-Kongreso 1949 en Graz.

Sekvis paroloj de s-anoj d-ro Halbedl, d-ro Hamwai (Budapest) kaj Schick, Leoben, kiu proponis aranĝi la 2-an E-Tagon de Stirio en Leoben. Poste la unua kunveno fermiĝis kaj komenciĝis la amuza parto gvidata de s-ano Podrepschek.

Dimanĉe la 3. 10. 48 sekvis la 2-a kunveno, en kiu estro Eder povis saluti la s-anojn Hawla, Wien kaj prof. Storm, Graz. S-ano Hawla reprezentante la E-centron Wien, Societon de Amikoj al Esperanto, Viena E-Delegitaron kaj E-societon „Danubio-n", transdonis salutojn kaj deziris al la stiria E-Tago la plej bonan sukceson. Poste parolis s-ano prof. Hainschegg pri la kaŭzoj de la malrapida disvastiĝo de Esperanto.

Post elekto de la Landestraro de AEF por Stirio kaj plenumo de la ceteraj tagordaj punktoj estro Eder fermis la kunvenon per instigaj vortoj al la partoprenantoj.

AEF-Landestraro de Stirio
elektiĝis okaze de la 1-a Esperanto-Tago en Graz. La plej gravajn funkciojn de la landestraro okupas jenaj ges-anoj: Prezidanto: d-ro Adolf Halbedl; vicprezidanto kaj afergvidanto: J. Eder; sekretario: A. Podrepschek; anstataŭanto: G. Mesaritsch; kasisto: A. Minauf; anstataŭanto: f-ino Kutschera.

E-grupo „Fonto", Felixdorf, N.-Ö., donacis ŝ. 100,—

al AEF por celoj de la E-movado kaj per tio ĝi estas la unua grupo respondanta la alvokon de la AEF-centro pri donacoj por fortigi la organizon. AEF kore dankas al la nomita grupo.

S-ano J. Sch., N.-Ö., donacis ŝ. 100,— por la E-movado, sed li modeste ne volas esti nomata. Koran dankon ankaŭ al li!

Vizito de 22 holandaj s-anoj en Landeck

La 16. 8. 1948 frumatene alvenis niaj junaj holandaj gastoj. En kvin tendoj instalitaj ĉe la ruino Schroffenstein, ornamitaj per flagoj holandaj kaj de TJO-sekcio Schoorl, 16 kamaradoj kampadis dum 12 tagoj. Muziko kaj kantoj eksonis vespere antaŭ la tendoj esperant- kaj holandlingve kaj allogis multajn Landeck-anojn. Kelfoje noktmeze aperis ĉe la tendoj gejunuloj el Landeck kaj prezentis al la holandaj gastoj hejmecajn kantojn kaj ludojn, kio eĉ daŭris ĝis la 2a frumatene.

Sed ankaŭ le montegoj de Tirol ravis la gastojn kaj sub gvidado de amikoj Meier, Kössler kaj Gstir Toni ili dufoje suprengrimpis 2400 m altan monton kaj kunprenis de sur tie la maloftan edelvejson.

Ni ankaŭ vizitis la helpservon de la usona Quäker-societo, kie ni pasigis agrablajn horojn inter usonanoj, angloj, danoj, holandanoj kaj aŭstrianoj. Okazis diversaj aliaj aranĝoj kaj ekskurso al Innsbruck, kie nin gvidis s-anoj d-ro Karner kaj Stöckl. Nur malvolonte ni fine tamen devis adiaŭi de niaj junaj gastoj kaj ni speciale dankas al la karavangvidantoj Bant kaj Braakensiek pro ilia kamaradeco. Ni Tirol-anoj certe tenos tiun agrablan viziton el Holando en bona memoro. A. Hilkersberger.

„Österreichische Postrundschau"
(Aŭstria poŝta komunikilo), organo de la ĝenerala direkcio por la poŝt- kaj telegrafa administracio, raportas en la numero de Novembro 1948 pri E-kursoj inter la poŝtistoj en Wien kaj publikigas enkondukajn vortojn en esperanto de ĝenerala direktoro d-ro Karl Dworschak, kiu skribas:

Estante la Honor-prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio kaj vicprezidanto de Internacia Ligo por Esperanto ĉe Poŝto, Telekomuniko kaj Transporto (ILEPTT), Paris, mi tre salutus tion, se laŭ eblo multaj poŝtistoj havus intereson por la Esperanto-movado, kiu fariĝos por Aŭstrio kaj speciale por poŝto, telegrafo kaj telefono ĉiam kaj ĉiam pli grava, kaj se ili vigle partoprenus je la kursoj de la Esperanto-Asocio de la poŝtistoj de Aŭstrio.

E-kursoj por poŝtistoj
okazas Wien I., Postgasse 8. Komencantoj: ĉiuvendrede de 17—19 h. Progresintoj: ĉiudimanĉe de 10.30—11.30.

Por kolegoj en la federaciaj landoj, kiuj emas lerni Esperanton, estas aranĝata skriba kurso. Anoncoj n al tiu kurso akceptas: J. Janecka, Wien XIX., Diemgasse 3.

E-kurso en la kadro de ÖVP. (popola partio)
estis aranĝata de la ĉiam agema s-ano kalkulkonsilanto R. M. Frey kaj komenciĝis la 6. 12. 1948 en la ejo Wien I., Wollzeile 7, ĉiulunde je la 18 h.

E-grupo „Konkordo" Wien X.

E-kursoj estis aranĝataj por komencantoj kaj progresintoj. La grupo laboras laŭcirkonstance. La membraro plejparte regule vizitas la kunvenojn.

La libraro enhavas 80 librojn. Sennaciulo, La Praktiko, Literatura Mondo, Internacia Kulturo kaj La Ponto estas abonataj por la grupanoj.

Goisern

Nia ŝatata s-ano kaj longjara nelacigebla Esperanto-pioniro kalkulkonsilisto R. M. F r e y (Wien), pasigis kun sia edzino la ferioj̆n en la belege situanta loko Goisern kaj malkovris tie tri instruistoj̆n lernintajn antaŭ multaj jaroj̆ Esperanton. Unu eĉ faris la ŝtatan E-ekzamenon. Laŭ sia kutima energio kaj propagandemo li tuj eluzis tiun okazon kaj faris la 15. 9. 48 en Goisern paroladon teme: „Kiun utilon havos Goisern de Esperanto rilate al fremdultrafiko?“ La kunveninvito aperis dum 10 tagoj̆ antaŭe diapozitive en la loka kino. La afero sukcesis kaj nun jam okazas E-kurso en Goisern partoprenata grandparte de instruistoj̆. Jen efiko de praktika propagando!

Tirol en vintro

nomiĝas la bele ilustrita faldprospekto en Esperanto, noveldonita de la Trafikoficejo por Tirol en Innsbruck. Pro la multaj mendoj̆ el la en- kaj eksterlando la eldono baldaŭ estis elĉerpita. Nun estas preparata nova faldprospekto titole: „Tirol en Somero“. Tiurilatajn informoj̆n donas kontraŭ reafranko s-ro Hans Steiner, Kirchbichl, Tirol, Aŭstrio.

E-Klubo Kufstein

La 18. 9. 1948 okazis la 2. ĉefkunveno de la klubo. Estro d-ro A. Huber esprimis la dankon pro fervora kunlaboro al la ges-anoj AEF-landestro Hans Steiner, polica inspektoro A. Kaufmann, inĝ. Zech, f-ino H. Winkler kaj al la s-roj̆ Schwaiger kaj Visneider. Poste li raportis pri la agado de la klubo. La kasisto donis kontentigan raporton. La rezulto de la novelektoj̆ en la estraron estis jena: Estro: d-ro A. Huber; vicestro: H. Visneider; kasisto: K. Scheiflinger; sekretariino: H. Winkler; revizoroj̆: inĝ. A. Zech, f-ino Tr. Fankhauser.

Kitzbühel

E-kurso estis aranĝata kaj la lokaj̆ ges-anoj̆ grupiĝas al aktiva agado sub la gvidado de s-anino A. Rainer. Adreso: S-ino Anni Rainer, Kitzbühel, Villa Burian, Tirol.

Wattens

La E-grupo laŭpove vigle agadas. E-kurso funkcias. Kunvenejo estas en la popola lernejo. Grupvespero ĉiumarde je la 20a h. Adreso: F-ino Mali Schmid, Lange Gasse 24, Wattens, Tirol.

En **Fieberbrunn**

aranĝiĝis kurso por komencantoj̆ gvidata de s-ro ĉefinstruisto Schmid.

Popola altlernejo Kufstein, Tirol

akceptis Esperanton en sian instruplanon. La samon faris la popola altlernejo en W ö r g l. La administracioj̆ de ambaŭ klerigaj̆ institutoj̆ akceptu pro tio la dankon de la Esperantistaro.

Esperanto-Skilernejo en Tirol

Esperantistoj̆ en- kaj̆ eksterlandaj̆ estas invitataj̆ partopreni la lernadon de la skisporto en la Unua Esperanto-Skilernejo de Tirol ĉe la ŝtate ekzamenita skiinstruisto Erwin V o r l a u f e r, Solbad Hall, Innsbruckerstr. 14, Tirol, Aŭstrio. (Pli detalaj̆ informoj̆ kontraŭ reafranko.)

Salzburg vigle propagandas

Ek de 23. 9. 1948 aperas ĉiusemajne en Salzburger Volkszeitung Esperanto-anguleto redaktata de la konata pastro domvikaro K a p s.

De 24.—26. 9. 1948 okazis en la filatelista sekcio Esperanto-ekspozicio sub la devizo: „Esperanton en la servon de la filatelio“.

La 4. 10. ĉj. komenciĝis en la Popola altlernejo E-kurso kun 26 partoprenantoj̆, gvidata de la konata s-ano F ö t i n g e r.

La gazetoj̆ Salzburger Volksblatt, Salzburger Volkszeitung kaj Salzburger Nachrichten akceptas priesperantajn komunikoj̆n kaj artikoloj̆n.

Fervojista Fakgrupo Esperantista, Linz

La E-kongreso en Linz postlasis al ĉiuj bonegan impreson. Ankaŭ la fakkunsido fervojista estis sukcesplena. La 13. Aŭg. partoprenis nian kunsidon ankaŭ s-ro fervoja prezidanto kortega konsilisto Hafok, kiu eĉ petis la vorton kaj en parolado promesis sian apogon de la E-movado inter la fervojistoj. Nome de la ĝenerala direkcio parolis s-ro Namors kaj akcentis, ke la fervoja administracio jam antaŭ 20 jaroj akcelis Esperanton inter la personaro kaj estas preta ankaŭ nuntempe fari la saman, se la fervojistoj grandnombre lernas la lingvon. Redaktoro Oskar Kovacic promesis nome de la fervojista sindikato la apogon de la E-movado fervojista.

Havante tiajn gravajn subtenojn moralajn ni fervojistaj Esperantistoj mem devas nun plenforte varbadi inter nia kolegaro. La maljunaj kolegoj instigu la junajn kaj ĉiuj anoj en la servolibera tempo partoprenu regule la grupvesperojn ĉiumerkrede je la 19.30a h. Grupejo en la U-Bau, ĉambro 28, vid-al-vide de la ĉefstacidomo.

Esperanto- kaj stenografiikurso

komenciĝis la 15. 9. 1948 en la fervojista kantino de Linz. La partoprenantoj al tiu kurso estis al lernado instigitaj pro la vizito de la holandaj gastoj en Landeck.

Nekrologo

Mortis fine de Oktobro ĉj. nia k-do Emil Fischer, estrarano kaj vigla kunlaboranto de la Fervojista fakgrupo esperantista en Wien. La fakgrupo funebras pro lia tro frua forpaso kaj konservos al li daŭran memoron.

E-grupo „Paca Vilaĝo" en Oftering ĉe Linz

La 26. 9. 1948 fondiĝis la nomita E-grupo per iniciato de s-ano Kirchmayr, en kies familio 5 anoj parolas Esperanton, kaj helpate de s-ano Wishofer. La fondiĝon partoprenis 36 personoj el Oftering, Linz, Wels, Lambach kaj Wien. Landestro de AEF por Supra Aŭstrio, s-ano K. Nigl, parolis kaj akceptis la novan grupon en la kadron de AEF. Sekvis paroladoj de s-anoj Kirchmayr kaj direktoro Franz el Wels. La grupo baptiĝis „Paca Vilaĝo" kaj ties estiĝo certe estas bela sukceso por la instigintoj.

Post la oficiala fondkunveno okazis la amuza parto kun muziko kaj kantado ĝis la meznokto. Okaze de la grupfondo fraŭlino H. Kirchmayr pentris vere belajn memorigbildetojn kun ilustraĵeto de Oftering, kiun memore ricevis ĉiu partoprenanto. Certe ĉiuj aŭstriaj geesperantistoj ĝojas pri la nova grupo en sia vico kaj deziras al ĝi prosperon kaj sukceson.

Schlerka.

Aŭtobusa ekskurso al Hainburg

La 17. 10. 1948 cent vienaj geesperantistoj enaŭtiĝis por viziti la urbeton Hainburg por tie iom propagandi Esperanton. S-ano Reithofer invitis nin kaj ankaŭ aranĝis ekskursojn al la antikvaj romanaj urbrestaĵoj de Carnuntum kaj al la militista amfiteatro. La famkonata romana muzeo de Deutsch-Altenburg kun siaj multnombraj interesaj elfosaĵoj estis vizitata kaj ĉiu miris pri la artecaj objektoj. Tiutempe speciale la manlaboraĵoj kaj skulptaĵoj jam estis unuarangaj.

Posttagmeze okazis du ekskursoj. Unu kondukis al la mezepoka kastelruino Röthelstein, de kie la Khuenringer entreprenis siajn rabirojn. En belega pelzaĝo ĝi situas sur rokmuro elstaranta el la akvo de la Danubo. La dua ekskurso kondukis nin al Braunsberg, sed malfeliĉe nebula vetero permesis vidi nur la proksimajn objektojn. Lacaj ni alvenis en la salonego, kie okazis la solenaĵoj. S-ano Reithofer esperantlingve salutis kaj dankis al la vienaj ges-anoj pro ilia morala subteno. S-ano Cech, afergvidanto de AEF kaj VED-prezidanto Vokal kore respondis. Vicprezidanto de AEF d-ro Grimme germane parolis al la ĉeestantaj Hainburg-anoj, instigante ilin al lernado de Esperanto.

Poste Vienanoj kaj enloĝantoj kune

amuziĝis kaj dancis. Nia nelacigebla s-ano Katzianka aranĝis ekspozicieton, kiu allogis multajn interesiĝantojn. Fine ni bedaŭrinde devis forlasi niajn geamikojn en Hainburg, sed ni promesis al ili ree veni en la venonta jaro.

Logo.

Leoben, Steiermark

La E-klubo „Kuraĝo“ laboras malgraŭ diversaj malfaciloj kaj malrapide kreskas. Kunvenejo estas en la Laborista ĉambro, 2. etaĝo, ĉiumarde je la 20a h. Adreso: Franz Schick, Leoben-Göß, Hauptstr. 7.

E-telegramoj el Aŭstrio ne permesataj

Okaze de la 33. U.K. en Malmö la aŭstria ĝenerala poŝtdirektoro kaj nuna Honora prezidanto de AEF, d-ro D w o r s c h a k, sendis al la kongreso E-lingvan saluttelegramon. Bedaŭrinde la telegramo ne atingis sian celon, ĉar la aliancana cenzura oficejo resendis ĝin motive, ke Esperanto kiel telegramlingvo ankoraŭ estas malpermesita. Tio estas nova pruvo, ke Aŭstrio ankoraŭ ne estas lando libera, sed lando okupita, kiu bedaŭrinda fakto ankaŭ multe malhelpas la evoluon de la aŭstria E-movado.

La organizo bezonegas viajn kotizojn

Bedaŭrinde ekzistas E-grupoj, formale aliĝintaj al AEF kiuj postulas pro tio de la centro diversajn apogojn kaj la liveradon de la organo Aŭstria E-Revuo, sed konstante „forgesas“ pagi la laŭstatutajn kaj de la E-kongresoj deciditajn kotizojn. Kompreneble tiamaniere la centro ne povas mastrumadi kaj plenumi la tutorganizajn devojn. Ni tial insiste devas peti la grupojn (izolulojn), ke ili zorgu pri la preciza enkasigo de la kotizoj flanke de la membroj kaj dekalkulu laŭorde al la centro ĉiumonate. La 15-an de la kuranta monato la kotizoj por la pasinta monato devas esti sendataj al la centro.

Grupojn, kiuj ne pagas kotizojn kaj tiamaniere ne plenumas siajn devojn al la tutorganizo, ni estonte devas publike admoni en la Revuo, kaj se tio nenion helpos, ili estos traktataj laŭstatute.

Aŭstria Esperanto-Revuo estos liverata estonte nur al t i u j grupoj (izoluloj), kiuj regule kaj ĝustatempe dekalkulas la kotizojn por siaj membroj al la centro. Laŭ kongresdecido ĉiu AEF-ano devas pagi por la tutorganizo pomonate šil. 1,—. Grupoj volantaj estonte regule ricevi la Revuon do zorgu, ke la grupanoj precize pagu siajn kotizojn. Pro la altaj preskostoj de la Revuo, al la grupoj nur tiom da ekzempleroj povos esti liverataj, kiom da kotizoj ili dekalkulos monate al la centro. Por partopagoj estos liverata ankaŭ nur la konforma kvanto de la organo.

Subtenantaj membroj por la grupoj

Kelkaj grupoj demandis la centran estraron, ĉu laŭstatute la grupoj rajtas akcepti kaj varbi subtenantajn membrojn por pligrandigi siajn financajn rimedojn. La centra estraro en sia kunsido de 20. 10. 1948 okupiĝis pri tiu demando, principe jesis ĝin kaj decidis, ke la mono enspezita per varbado de subtenantaj membroj per la grupoj plene restu e n l a g r u p o j mem por iliaj celoj.

Donacalvoko

Per la relative eta kotizo la organizo ne povas plenumi diversajn necesajn organizajn aferojn.

Tial ĉiuj E-grupoj kaj izoluloj estas alvokataj laŭpove kolekti d o n a c o j n por la E-movado kaj sendi la monon al la Centro.

Ni estonte publikigos en la Revuo la nomojn kaj donacitan sumon de la respektivaj grupoj aŭ izolaj membroj.

Aŭskultu la E-sendojn de radio Wien II

ĉiuĵaude de 18.45—19.00 MET, metroj 228,6, 31,05, 41,81 kaj sendu al la stacio multnombre konsentajn leterojn aŭ kartojn, per kiuj vi multe helpas al ni povi daŭrigi la E-radioprogramon kaj eventuale plivastigi ĝin. Adreso: Ravag, Wien IV., Argentinierstr. 30a. (Radioservo de AEF.)

Kantoj kaj arioj

estas la titolo de faldprospekto, en kiu estas kolektitaj kantoj de Schubert,

Heine, Hölty k. s. esperantigitaj de la eldoninto mem el sia repertuaro: Riko Lorenzo, radio- kaj koncertkantisto en Dornbirn, Bildgasse 23, Vorarlberg, Aŭstrio.

Riko Lorenzo skribas: Traduki la belajn kantojn de la grandaj majstroj en la internacian lingvon signifas, ke tiuj veraj perloj de muziko estonte ne nur apartenos al naciaj lingvoregionoj, sed al la tuta mondo. Ricevinte antaŭ kelkaj monatoj de progresema radiostacio la inviton prezenti klasikajn kantojn en Esperanto, mi estis unue en embaraso. Mi devis konstati, ke nur tre malmultaj tradukoj ekzistas kaj ke eĉ al tiuj mankas la ĝusta poezia ĉarmo konforma kun la genIaj kompozicioj. Inspirate de la ravaj melodioj, mi fine mem provis traduki konsiderindan nombron da same konataj kantoj el la germanaj kaj italaj originaloj kaj mi estis surprizata pri la taŭgeco de Esperanto por tiu vere komplikita verkado. Kapabla traduki ankaŭ el la angla, franca, hispana kaj rusa lingvoj, mi aspiras pligrandigi tiel la propran repertuaron kiel entute la provizon je belaj kantoj kaj arioj en Esperanto laŭ bezono de la nuna tempo. Kiu povas favorigi iel ĉi tiun gravan laboron bonvolu interrilati kun mi.

Volksbildungshaus Margareten

(Popolkleriga instituto), Wien V., Stöbergasse 11, denove akceptis Esperanton en sian programon por fremdlingvoj dum la vintra duonjaro.

Dungitoj de la urbo Vieno

nun ankaŭ lernas Esperanton en kurso aranĝita de la sindikato. La kurso okazas ĉiuvendrede de la 18—20a h. en la ejo Wien VIII., Zeltgasse 7. Gvidanto: Bouche.

E-grupo „Gaswerk"

kiu fondiĝas en Januaro 1948 havas sian sidejon en la direkcia domo Wien VIII., Josefstädterstr. 10. Kunvenoj estas ĉiun duan kaj kvaran merkredon en la monato de la 16.30—18 h. Korespondadreso: S-ro August Schlerka, Wien XV., Schuselkag. 6/8.

Esperanto-infankurso

aranĝita en la kadro de la societo „Infanamikoj" okazas ĉiusabate de la 15—17 h. en Wien XII., Siebertg. 1. Kursgvidanto: Bouche.

„Berg frei"

n-ro 5/1948, organo de la societo „Naturamikoj", landorganizo Steiermark, enhavis varbcelan por Esperanto artikolon de s-ano Fötinger. Salzburg.

„Ruf der Jugend"

(Voko de l'junularo) organo por junaj aŭstrianoj (katoliktendenca) publikigis en n-ro 42/1948 interesan priesperantan artikolon de s-ano Oskar Sinner.

Esperanto-ekspozicioj

por efike akceli la propagandon por Esperanto lastatempe estis aranĝataj diversloke en Aŭstrio.

W i e n. La 13. — 18. 9. 1948 okazis en la Popolkleriga instituto IX., Galileigasse E-ekspozicio, aranĝita de la E-grupo „Laboro" sub la gvidado de s-ano Hugo Kraus.

Okaze de la E-Tago en Wien, la 9. 10. 1948 s-ano Katzianka aranĝis E-ekspozicion en la kunvenejo.

Same estis aranĝata de s-ano Katzianka E-ekspozicio la 23. — 24. 10. 1948 en la sindikatejo de la ledo- kaj ŝuolaboristoj en XV., Markgraf-Rüdigerstraße 4.

En la kadro de ĝenerala kulturcela ekspozicio de la Popolkleriga instituto Margareten ankaŭ okazos E-ekspozicio la 15. — 31. 1. 1949 en la ejoj disponigataj de la grandega varvendejo A. Gerngroß.

L i n z. En la elmontraj fenestroj de la vardomoj Pasch kaj Huber en Urfahr aranĝis s-ano S a ß m a n n efikan E-ekspozicion.

K l a g e n f u r t. S-ano Dürrschmid akiris okaze de metia ekspozicio eĉ propran E-standon por montri al la publiko gravajn verkojn de la E-literaturo k. s.

L e o b e n. La 6. — 7. 11. 1948 okazigis E-ekspozicion la grupo „Kuraĝo" en la Laborista ĉambro. Paroladojn faris d-ro A. Halbedl kaj G. Katzianka. La sukceso estis kontentiga.

AER 1949 FEB

Gasuzino Wien.

La 9. — 10. 11. 1948 aranĝis la E-grupo de la gasuzino E-ekspozicion en la direkcia domo VIII., Josefstädterstraße 10, kiu estis vizitata de multaj dungitoj.

Financ-oficistoj lernas Esperanton

kaj vizitas kurson depost 10. 11. 1948 ĉiumerkrede de la 16 — 17a h. en la kursejo Finanzamt für Verkehrssteuer und Gebühren Wien III., Vordere Zollamtstraße 5. Kursgvidanto: Oficejkonsilanto H. Matiß v. Sik-Abony.

Radio-sendilo „Alpenland"

(Graz, Zusertalgasse 14a), responde informis la E-centron en Wien, ke la administracio estas preta — ankaŭ pro multaj alskribaĵoj el la publiko — akcepti en la programon E-kurson depost 7. Januaro 1949 ĉiuvendrede de la 18.15 — 18.30 h. Krome la sendilo disponigos al al E-Societo „Unueco" en Graz komence de 1949 monate kvaronan horon por paroladoj en aŭ pri Esperanto. La direkcio de la nomita sendilo pro tio certe meritas la dankon de la tuta E-movado, kiun ni esprimu per multaj alskribaĵoj al la supre nomita adreso.

Aŭstria Laborkomunumo por Popolsaneco

(ĝen. sekr. Wien I., Annagasse 5) okazigis en Nov. 1948 gravajn paroladojn (germanlingve) de eminentaj sciencaj fakuloj pri aktualaj temoj kaj tiamaniere multon kontribuas al la klarigo de la popolo rilate al la flegado kaj konservado de ĝia sano. Aliaj klarigaj paroladoj estas preparataj. Informojn donas la ĝeneral-sekretariejo.

LABORISTA ESPERANTISTARO

Adreso: Austria Laborista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9

Kunveno de Aŭstria Laborista Esperantistaro

bone vizitata okazis sabate la 6. 11. 1948. K-do Sager malfermis ĝin salutante speciale la Honorprezidanton de ALE, eksministron d-ro Hans Frenzel, la vicprezidanton de AEF, k-do d-ro L. Grimme kaj kvar gek-dojn el St. Pölten. Per kanto komenciĝis la kunveno kaj poste parolis d-ro Frenzel, skizante la celon de sia honora funkcio en ALE kaj substrekante la neceson de unueco en la kultura kunlaboro inter la socialista kaj komunista sekcioj (aplaŭdo). Referis k-doj Sager kaj Slezak (soc. sek.) pri la estontaj laboroj kaj k-do Haiderer (kom. sek.) raportis pri la farita kaj farota agado. K-do Vokal esprimis la kontenton pri la konkorda kunlaborado de ambaŭ sekcioj. Sekvis paroloj de k-doj Stöckl (Wien), Feilbacher (St. Pölten) kaj de k-do Antonio, kies raporto, ke li sukcesis aranĝi E-kurson en la maŝinfabiko Voit en St. Pölten kun 34 kursanoj, elvokis aplaŭdon. K-do Finkenzeller raportis pri la E-movado inter la „Naturamikoj" kaj instigis okazigi konvenatempe E-ekskurson al St. Pölten por kuraĝigi tie la movadon. Akceptite.

Pro alia okupo k-do d-ro Frenzel devis pli frue forlasi la kunvenon, sed antaŭ sia foriro li faris simbolan geston: li ekprenis manon de la estroj de ambaŭ laboristaj sekcioj kaj petis ilin, konkorde kaj unuece daŭrigi la komunan agadon por Esperanto en la laboristaj rondoj.

Post kelkaj aliaj raportoj la gek-doj el St. Pölten ankaŭ devis foriri, kore adiaŭate de la vienaj gek.-doj.

Alvenis sub aplaŭdo ĉefredaktoro Nikolao Hovorka, estrarano de la Aŭstria Societo por kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj al Sovjetunio. Li faris paroladon pri la 31-a datreveno de la rusa revolucio, donante historian superrigardon pri la tiamaj politikaj okazin-

taĵoj kaj ties sekvoj ĝis en la nuntempo, substrekante la pacvolon de la Sovjetunio (aplaŭdo). Fermante la kunvenon, la estro petis pri regula partopreno al la aranĝoj de ALE kaj por-esperanta propagando inter la laboristaro.

Grava subvencio de la Sindikata Ligo

per la sumo de ŝil. 1000.— estas donita al la Aŭstria Socialista Esperantistaro.

La socialistaj esperantistoj alte taksas ĉi tiun gravan financan helpon kaj publike esprimas al la Sindikata Ligo la plej varman dankon.

Aŭstria sindikato subskribis la peticion al UNO

prezidanto F. Weigelt kaj sekretario H. Mattes de l' sindikato de la laboristoj en la grafika kaj paperprilaborantaj metioj subskribis la 9. 11. 1948 kolektive por 23 000 sindikatanoj la peticion al UNO pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj turismon.

Socialista Esperantistaro

de Vieno kunvenis la 18. 12. 1948 en la E-Centro por pritrakti aktualajn aferojn. Estro Slezak raportis, ke laŭ iniciato de k-do Stöckl la estraro de la Aŭstria Sindikata Ligo letere informis la Socialistan Esperantistaron, ke ĝi decidis subvencii la poresperantan agadon inter la laboristaro per ŝ 1000.—. La komuniko kun aplaŭdo kaj dankesprimo estis ĝoje akceptata. Per la disvendado de konstruŝtonoj po 50 g kaj 1 ŝil. ĝis la 18. 12. 1948 enfluis 450 ŝil. Tiamaniere la projektita aĉeto de urĝe bezonata presilo ŝajnas nun efektivigebla. Post priparolo de aliaj aferoj, k-do Hawla, estrarano de la Fervojista fakgrupo raportis pri la konferenco de fervojistaj esperantistoj en Paris la 2. — 5. 12. 1948, kiun partoprenis li kaj k-do Zink.

En Parizo la aŭstriaj fervojistaj esperantistoj estis komisiataj aranĝi internacian renkontiĝon de fervojistaj esperantistoj. La kunveno verŝajne okazos la 2. — 3. 4. 1949.

ALE regule kunvenas:

La komunaj aranĝoj de ambaŭ sekcioj okazas ĉiun 1-an sabaton en la kuranta monato je la 16-a h. en la E-centro, I., Neutorgasse 9. Se la pordo estas ŝlosita bonvolu sonorigi.

Socialista sekcio kunvenas ĉiun 3-an sabaton en la respektiva monato je la 17-a h. en la E-centro.

Komunista sekcio kunvenas ĉiun 1-an sabaton en la kuranta monato je la 14.30-a h. en la E- centro.

Proleta kantaro

n-ro 2,8 pĝ., broŝureto eldonita de ALE aperis kaj kostas nur 20 groŝojn kaj sendkostojn.

22-a Kongreso de SAT

okazos la 30. 7. — 5. 8. 1949 en Paris kaj ni povas esperi, ke la partoprenemuloj el Aŭstrio fakte ricevos la envojaĝpermeson en Francujon. SAT-anoj do preparu vin jam nun por la partopreno en la Pariza kongreso kaj anoncu vin laŭeble plej baldaŭ por povi ĝustatempe ordigi ĉiujn necesajn formalaĵojn en la konsulejo.

SAT-kotizo por 1949

estas fiksita egale por ĉiuj landoj valore je 4 horoj de minimuma salajro de nekvalifikita laboristo. Por Aŭstrio la kotizo estas ŝil. 15.— kun abono de „Sennaciulo". SAT-anoj pagu tuj je la poŝtŝparkasa konto n-ro 193.114, L. Sager, Wien. Informojn kontraŭ reafranko donas la landa peranto k-do L. Sager, Wien XVI., Maderspergerstraße 14/12.

Ankaŭ vian aktivan kunlaboron bezonas la organizo

Katolika Esperanta Vivo

Adreso: Austria Katolika Ligo Esperantista (AKLE), sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Austrio

Vienaj katolikaj esperantistoj
regule kunvenas ĉiun duan kaj kvaran mardon en la monato inter la 17. — 19 h. I., Graben 13/II, Kreuzbundheim. — Kurso samloke ĉiumarde de la 19.30 — 20.15 h. — Ekspozicio pri St. Stefan-kadetralo komune estis vizitata la 13. 11. 1948.

Di-servo kun E-prediko profundimpresa
de P. Georg Plank okazis en la Karlo-preĝejo la 20. 11. 1948 je la 18.30 h. memore al la mortintoj kaj viktimoj de la E-movado dum la periodo de la nazia subpremo kaj milito. Partoprenis la sanktan meson preskaŭ 100 ge-esperantistoj.

Respondoj al niaj sindonleteroj
okaze de la katolika fakkunsido dum la E-kongreso en Linz alvenis de: Kardinalo d-ro Th. Innitzer; princa ĉefepiskopo d-ro A. Rohracher, Salzburg; princa episkopo d-ro F. Pawlikowsky, Graz-Seckau; princepiskopo d-ro J. Köstner, Gurk-Klagenfurt kaj episkopo d-ro P. Rusch, Innsbruck.

Tiuj leteroj estu por ni esperantistoj instigo al plua agado!

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
komunikis, ke pro valutaj aferoj ĝia organo „Espero Katolika" provizore ne povas aperi.

Katolika sekcio de Germana E-Asocio
nun havas jenan adreson: (13b) München, 13, Mittermayerstraße 18/c.

Fondkunveno de KUE en Salzburg
okazis la unuan adventdimanĉon 1948 en Salzburg-Parsch. Partoprenis ĝin kiel altranga kaj altŝatata gasto lia moŝto la princa ĉefepiskopo de Salzburg d-ro Andreo Rohracher, kiu interese rigardis la E-ekspocion. Lanestro d-ro Rehrl kaj vicurbestro Hildmann sendis salutleteron. AEF-landestro de Salzburg s-ano Fötinger persone transdonis la salutojn kaj dezirojn de la Salzburga esperantistaro. Venis salutleteroj inter aliaj de AKLE-estraro Wien, d-ro A. Halbedl, Steiermark kaj Hans Steiner, Tirol.

Parolis la Honora prezidanto de la E-societo Salzburg prof. d-ro Christanell, vikaro Kaps kaj ĉefinstruistino s-rino Lisl Oberlechner el Saalfelden.

Princa ĉefepiskopo d-ro A. Rohracher promesis al la katolika E-movado sian subtenon konsiderante Esperanton taŭga ilo por la interkompreniĝo de la popoloj. Kun la episkopa beno kaj la E-himno fermiĝis la kunveno.

Sincere gratulas la KUE-anoj al prof. d-ro F. Christanell okaze de lia eknomiĝo je ĉefepiskopa eklezia konsilanto kaj al dehanto F. Kocher, Saalfelden, pro lia eknomiĝo je ĉefepiskopa konsistarial-konsilanto.

Esperanto-Tago en Schlaining, Bgld.
Okaze de tiu E-aranĝo celebris la sanktan meson en la katolika preĝejo franciskana pastro H. Hebenstreit el Graz. Leginte la evangelion pri la bonkora samariano, li poste predikis tiusence tuŝante niajn korojn. La homaro nur povas resaniĝi, se la bonfara amo efikos pli forte. Jes, la amo devas stari ankaŭ malantaŭ ĉiuj niaj agoj, la amo devas stari ankaŭ malantaŭ nia Esperanto. Ni devas krei verkojn de amo, de kompreno reciproka, de konstrua laboro kaj en sociala senco, kiuj akcelas kaj fortigas la pacon inter la homoj kaj popoloj. Hans Bauer.

Karaktera formado
kaj plivastigado de la spirita horizonto estas rezultoj de serioza Esperanto-instruado, konstatis d-ro Peter Hohenwarter de Marianum en Klagenfurt, okaze de la fakkunveno de la katolikaj geesperantistoj en Linz, Aŭgusto 1948.

Internacia ESPERANTO-MOVADO

34-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bournemouth, Anglujo, de 6. — 13. 8. 1949. Aliĝojn kaj leterojn oni direktu al: 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmanswoth, Herts., Anglujo.

Aŭstriaj partoprenemuloj krome anoncu sin ĝustatempe ĉe la Esperanto-centro pro havigo de pasportoj kaj envojaĝpermeso. Aldonu reafrankon!

Universala Esperanto-Asocio (UEA).
La nova ĉefdelegito por Aŭstrio estas Ph. Mr. F. Höfert, Wien XIV., Penzingerstr. 121. Li invitas ĉiujn aŭstriajn geesperantistojn aliĝi al UEA kaj donas pli detalajn informojn kontraŭ reafranko.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Aŭstrio estas reprezentata de la landa ĉefperanto k-do Ludwig Sager, Wien XVI., Maderspergerstraße 14/12, kiu donas ĉiujn informojn pri SAT kontraŭ reafranko.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista konfidis sian reprezentantecon en Aŭstrio al la sekretario de AKLE s-ano Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9. Petante informojn aldonu reafrankon.

Kristana Frataro
en Aŭstrio estas reprezentata de s-ano Alois Hilkersberger, Lotzweg 1, Landeck, Tirol. Kontraŭ reafranko vi povas peti informojn pri la celoj de Kristana Frataro.

Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomunikoj kaj Transportoj
estas reprezentata en Aŭstrio de s-ano Johann Janecka, Diemgasse 3/14, Wien XIX., kiu akceptas aliĝojn al la nomita ligo. Jarkotizo kontraŭ livero de la organo La Interligilo estas ŝil. 12.—. Petante informojn sendu reafrankon.

Universala Ligo
eknomis kiel sian reprezentanton en Aŭstrio s-anon Hans Steiner, Kirchbichl, Tirol. Li akceptas membrojn por UL kaj sendas detalajn informojn kaj prospekton kontraŭ reafranko.

Universala Ligo
celas: akceli la unuiĝon de la popoloj por la sekurigo de la mondpaco en tutmonda federacio demokrate organizita laŭ la principoj de persona libereco, nacia egalrajteco, socia justeco, ĝenerala klerigo, organizita monekonomio kaj solidareca kunlaboro.

La oficiala lingvo de la Ligo estas Esperanto. La agado de la Ligo ne estas politika, sed kultura, eduka kaj praktike realiga.

La riĉe ilustr. organo „La Praktiko" pojare kostas nur ŝil. 24.—.

Danubregiona Konferenco
akceptis gravan rezolucion pri interŝtata trafiko, proponita de la anstataŭa direktoro de la Budapesta Urba Fremdultrafika Oficejo (Budapest V., Deak Ferenc-utca 2, Hungarujo), s-ro Gyula Biro:

1. Urĝe oni organizu kaj realigu la konstantan kaj laŭsisteman plilarĝigon de la esperantlingva propagando inter la landoj partoprenintaj tiun ĉi konferencon.

2. La Budapesta Fremdultrafika Oficejo volonte donas ĉiun eblan subtenon por la Esperanto-societoj.

3. Kiel pli malproksima celo estas proponata la fondiĝo de fremdultrafik- kaj laborkomunoj pere de Esperanto,

kies ekzisto ebligos la baldaŭan kaj sukcesan evoluon de amasaj vojaĝmovadoj.

Rimarkigo: Nun temas pri tio, ke la E-organizoj de la landoj reprezentitaj ĉe la Danubregiona Konferenco fakte realigu la unuanime akceptitajn proponojn aŭ almenaŭ faru la necesajn preparlaborojn kun sialandaj trafikoficejoj ĝis reciproka turismo senĝene estos ebla.

Danublanda Kontakta Komitato

Aliĝis la 7. 9. 1948 ankaŭ la E-Asocio en la Ĉehoslovaka Respubliko ,nova adreso: Praha XIX/VII, pošt. přihrád. 7075. Ĉehoslovakujo. La nomita asocio decidis dissendi la protokolojn de sia CK al ĉiuj danublandaj E-asocioj aliĝintaj al la DKK, por ke ili estu informitaj pri la agado de EACSR.

Tiu ĉi decido estas imitinda ankaŭ por la ceteraj DKK-anoj kaj bonega rimedo pri reciproka informado.

Germana Esperanto-Instituto

La iam vaste konata Germana- E-Instituto en Leipzig pereis dum la periodo de la Tria regno. La E-movado nuna en Germanujo forte klopodas restarigi ĉi tiun instituton kaj ekzistas la espero, ke ĝi baldaŭ estos malfermata kiel oficiala instituto de la unuiversitato München.

La E-instituto jam nun laboras sub la provizora adreso: Germana E-Instituto, (13b) München-Pasing, Engelbertstraße 7.

„Esperanto-Post" (E-Poŝto)

estas la monata organo de la Germana Asocio de Amikoj al Esperanto, kies 8 pĝ., ilustr. n-ro 1 aperis en Oktobro 1948 kun interesa enhavo, laŭ ĝia celo plejparte germanlingve. La germana E-movado per tio do imitis la aŭstrian modelon de aparta organizo por altiri la atenton de vasta publiko pri Esperanto. AEF kaj la Aŭstria Societo de Amikoj al Esperanto kore gratulas al la samcela germana movado pro ĝia energia agado kaj deziras al ĝi plenan sukceson.

Irlanda E-movado

petas la subtenon de la tutmonda esperantistaro per alsendo de almenaŭ unu poŝtkarto por elmontri, ke Esperanto vivas ĉiulande. Adreso: Redaktoro Comhar, 38 Sraid an Fheisti, Dublin, Irlando.

Enketo en Islandaj lernejoj

estis farata de la Islanda E-Asocio pri la demando, ĉu la lernantoj deziras, ke oni instruu Esperanton en la lernejoj. Rezulto: 72,5% respondis per jes kaj 17,1% respondis per ne. 10,4% ne donis respondon aŭ sintenis neŭtralaj.

La landa E-asocio do entreprenis paŝojn ĉe la kompetentaj instruaj aŭtoritatoj pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Japana E-movado ekfloras

kaj jam ekzistas denove pli ol 50 grupoj. Pasintjare aranĝiĝis 76 E-kursoj kun 1228 lernantoj. Japanaj scienculoj interesiĝas pri Esperanto. En la medicina Fakultato de Zikoi oni la lingvon devige instruas. Adreso: Japana E-Instituto, Hongo-Matomaĉi 1—13, Tokio.

Centra Dana E-Ligo, Libro-Servo

raportas pri la grava eldona laboro farita de la eldonejo de l'granda dana tagĵurnalo „Politiken". Kunlabore kun la Libro-servo de CDEL ĝi eldonis E-lingve la libron: Faktoj pri Danlando, 64 pĝ., ilustr., prezo 3 dkr., havebla ĉe Libro-servo de CDEL, Pr. Jorgensgade 4 A, Kopenhago N.

Monda Bonvol-Servo

Dominion Boulevard Windsor, Ontario, Kanada, dissendas esperant- kaj anglalingvan cirkuleron kun peto pri donacoj (mono aŭ materialo) por establi ŝirmejojn por rifuĝintoj kaj elhejmigitoj en la usona zono de Germanujo.

Germana E-Kongreso 1949

okazos pentekoste (3.—7. 6. 1949) en Göttingen. Post la kongreso estos aranĝata E-junulara tendaro. Aliĝoj jam nun estas akceptataj. Kongreskotizoj: plenaĝuloj DM 10,—, geedzaj paroj 12,—, gejunuloj sub 21 j. 5,—. Post la 31. 3. 49 por ĉiu persono DM 15,—. Aliĝadreso: E-Grupo Göttingen, (20b),

Göttingen, Kreuzbergring 22. Germanujo. (Laŭ „La Ponto".)

Triesta E-Asocio
ankaŭ vigle laboras kaj eĉ eldonas multobligitan informilon „Espero". ,arabono 10 resp. kup. Adreso: Corso Garibaldi 2. Trieste.

Tutmonda Junulara Organizo.
Centro West Graftyk. Nederlando, nuntempe nombras 1600 membrojn el 20 landoj. La 5. Internacia Kunveno de TJO okazu 1949 en Versailles, Francujo.

„La Estonto Esperantista"
estas la monata 8 pĝ. organo de la Junulara Sekcio de la Germana E-Asocio. Specimeno kontraŭ afranko de la Junulara Sekcio de GEA. Hanover-L. 1. Postfach, Germanujo.

Esperantistoj fariĝis ministroj.

S-ano Istvan M. Kossa estis eknomata ministro de industrio en Hungarujo. S-ano J. M. Kossa longjare laboris en la hungara laborista E-movado kaj ankaŭ gvidis la tramistan E-grupon. Li krome estas gvidmembro de la Hungara Laborista Partio.

S-ano Tyyne Leivo-Larsson fariĝis ministro por socialaj aferoj en la nova finnlanda registaro.

Helpu portugalajn esperantistojn!

La portugala E-movado renaskiĝis kaj ĝi bezonas la helpon de ĉiuj s-anoj. Helpu sendante almenaŭ unu E-libron por Cirkulanta Biblioteko. Adreso: Portugala Esperanto-Ligo, Apartado 125, Lisboa N., Portugalujo.

Bibliografio

Racia kaj internacia kemia Nomenklaturo
(Kritikaj studoj pri la sistematiko kaj logiko de la kemia nomenklaturo) de dipl. inĝ. Curt Dellian. Multobligita kajero, form. 29×20 cm, eldonita de la Inĝeniera sekcio, Esperanto-Centro, München 23, (13b). Postfach 47, Germanujo.

La aŭtoro celas alporti ordon en la novajn teknikajn kaj kemiajn terminojn laŭ certaj metodoj, kiuj formas la tielnomitan nomenklaturon. La skribaĵo estas rekomendinda al ĉiuj science laborantaj Esperantistoj.

Scienca Rondo

Fakgazeto por fiziko, kemio, medicino, biologio kaj similaj fakoj. Oficiala organo de ISAE. Eldonejo: Inĝeniera sekcio, Esperanto-Centro, München 23, (13b), Postfach 47, Germanujo. Prezo de unu numero 3 resp. kup.

La provizore multobligitaj kajeroj de la nomita revuo enhavas multajn sciencajn artikolojn pri diversaj fakoj kaj konataj fakuloj esperantistaj apartenas al la kunlaborantaro. Tial Scienca Rondo meritas vastan legantaron en tutmondo.

Ankoraŭ pri la **grava medicina eltrovo** publikita en AER, n-ro 1-3/1948, pĝ. 22:

Sekve de la granda eho, komunikita en AER, n-ro 7-9/1948, pĝ. 81, ankoraŭ daŭranta, precipe pro anglalingva represo en Brita medicina ĵurnalo, tradukita laŭ la Esperanto teksto aperinta en „SAT-amikaro", la tre ĝojigita eltrovinto d-ro Zajicek la 29an de Novembro 1948 skribis jenon al „Aŭstria Esperanto-Servo" (tradukita ekstrakto el la germanlingva letero):

„Mi dankas vin pro la transsendo de pluaj 4 leteroj el Anglujo. Ili pruvas, ke „Esperanto-Servo" taŭgas por diskonigi grandajn medicinajn eltrovojn al la suferanta homaro kaj iliaj reprezentantoj en eksterlando pli rapide ol tio estas farebla per medicinaj fakgazetoj. Mi plene rekonas viajn sukcesajn klopodojn kaj transdonas al vi kiel malgrandan esprimon de mia rekono, por kovri viajn elspezojn, 100.— aŭstr. šil. . . ."

Ni aldonas ankoraŭ por la interesitaj fakuloj, ke provado de lia metodo, kuraci paralizojn per trahaŭta traktado per „spirfermentoj", por reaktivigi la paralizitajn nervocentrojn, lastjare en la Innsbruck'a kliniko por nervomalsanoj rezultigis, ke tiu ĉi metodo estas oli efika ol ĉiuj aliaj ĝis nun aplikitaj

metodoj de kuracado de paralizoj. 90% de la ĉi-metode traktitaj malsanuloj je poliomjelito montris subjektivajn kaj ĉirkaŭ 50% montris objektivajn simptomojn de resaniĝo.

Science interesitaj personoj povas peti detalajn informojn de la eltrovinto: Dr. Otto Zajicek, Wien IV., Schwindg. 9.

Nuntempa Pollando

Broŝuro kart., form. 21×15 cm, 60 pĝ. kun fotobildoj de pollandaj ŝtatistoj nuntempaj, eldonita de la Asocio de Esperantistoj en Pollando, Varsovio, Marszalkówska 81/32. La broŝuro informas pri la sukcesoj, kiuj estis atingitaj en la rekonstruado de la lando el la ruinoj postlasitaj de la dua mondmilito.

Jarlibro de UEA 1948

eldonita de la Universala E-Asocio, Heronsgate, Rickmanswoth, Herts., Anglujo. Neaĉetebla, sed recivebla nur por la membroj de UEA. La volumeto kun 248 pĝ. estas grava manlibro por ĉiu serioza esperantisto, volanta informiĝi pri la E-movado tutmonda. Krome ĝi enhavas adresaron de la landaj delegitoj.

Hristo Botjov: Versaĵoj

Broŝuro kart., 47 pĝ. kun 17 poemoj el la bulgara literaturo esperantigitaj de Ivan Dobrev, eldonita de la Centra Librejo „Esperanto", Sofio, Maria Luiza 38, Bulgarujo.

Vivo de Nansen

de Agostinho da Silva, eldonita de la Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa, 49—1, Porto, Portugalujo.. La aŭtoro skizas en ĉi tiu malampleksa broŝureto karakteron kaj sukcesojn de la famkonata Fridtjof Nansen, norvega esploristo, en bonega traduko.

NI

Sub tiu titoleto aperis broŝureto montranta per desegnaĵoj la kulturevoluon homan de la pratempo ĝis la nuna periodo. Je 2 resp. kup. havebla ĉe: „La Bosketo", Whiteway apud Stroud, Glos, Anglujo.

Interstena Informilo

kvarpaĝa folio por interesiĝantoj de la Esperanto-stenografio. Aperis n-ro 1 en Aŭg. 1948. Prezo 1 resp. kup. Eldonanto: C. Daglio v. Campanella 35, Tortona (Aless.), Italujo.

Danlando

estas la titolo de bele ilustr. faldprosp. kun landkarto pri diversaj interesaj detaloj, eldonita kaj senpage ricevebla de la Turista Asocio de Danlando, Bernstorffsgade 8, Kopenhago K., Danlando.

Bonvenon en Kopenhago

titoliĝas faldprospekto kun multaj interesaj informoj pri hoteloj, vidindaĵoj k. c. Eldonis kaj dissendas Kopenhaga Turista Asocio, 55 Raadhusplads, Kopenhago.

Komunikoj de la redakcio

Pro la malpliigita amplesko de la Revuo diversaj interesaj raportoj devis esti mallongigitaj kvazaŭ telegramstile kaj kelkaj artikoloj preparitaj por publikigo denove devis esti prokrastitaj.

Sendintoj de artikoloj, dezirantaj respondon pri akcepto aŭ malakcepto de siaj artikoloj, devas aldoni reafrankon.

La germanlingva komplemento al AER provizore ne plu povas aperi pro tro altaj preskostoj superantaj la financan buĝeton de AEF (vidu la enkondukan artikolon).

Pro financaj kialoj la numero 7—9 (Julio/Septembro 1948) de AER estis la lasta en la jaro 1948.

Richtigstellungen

Wir wurden ersucht, nachstehende Berichtigungen zur Deutschsprachigen Beilage der AER 8/9 1948 zu bringen: Seite 3, 2. Absatz: Dr. Froschauer ist nicht Fremdenverkehrsreferent von Steiermark, sondern von Graz. Seite 8: Im Bericht zu SPÖ — Freie Schule „Kinderfreunde" soll es richtig heißen 14.000 Erwachsene, nicht 14.000 in ihr organisierte Kinder.

PROSPERIGAN NOVJARON

ni deziras al ĉiuj AEF-anoj, ĉiuj funkciuloj kaj kunlaborantoj de la aŭstria Esperanto-movado, al niaj multaj geamikoj en la en- kaj eksterlando kaj afable petas ilin pri nova aktiva kunlaborado en 1949!

Redakcio de
Aŭstria Esperanto-Revuo

Estraro de
Aŭstria Esperantista Federacio

Aŭstria Esperanto-Instituto

Nova Esperanto-gazeto el Aŭstrio:

MONDA TRIBUNO

internacia gazeto por kulturo, literaturo, scienco kaj tekniko
Redaktejo kaj administrejo: Vieno IX., Rossauerlände 27

Abonkotizo pojare 12,— ŝil.

„INTERNACIA KULTURO“
Monato organo de la Danubregionaj Esperantistoj,
aperas en Sofio, Str. Tri Uŝi 15, Bulgario.
„Internacia Kulturo“ estas grandformata, 24 pĝ., ilustrita, demokrattendenca, kontraŭfaŝista revuo kaj havas kunlaborantojn en multaj landoj.
Jarabono ŝil. 20.— ĉe TRAMONDO, Wien I., Neutorgasse 9.

Aŭtoro de manuskripto pri **Greta Garbo** serĉas filmprogramojn ktp. pri ŝi. Adreso: Walter Steinhauer, Wilhelminenstraße 67, Wien XVI., Aŭstrio

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. — Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. — Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6. — Papierzuweisung 101/48/4-5, Bezugscheinnummer 61/86.

Vbb (Zl. 3216/1947)

La Esperanto-eldonejo

TRAMONDO

Vieno I., Neutorgasse 9

reduktis la prezojn de jenaj libroj:

	anstataŭ	nun nur
	ŝil.	ŝil.
Handwörterbuch Esperanto—Deutsch	9,—	7,—
„Senhalte al la celo", legolibreto de A. Norbert	4,—	3,50
„La mondopaco kiel psikologia problemo" de Hans Thirring, tradukita de Hugo Sirk	3,—	2,—
„Tri majstronoveloj" de Stifter, Storm, Kleist, tradukitaj de E. Pebe	5,50	3,—
„Junaĝo" de A. Stieger, tradukita de F. Th. Bischof . . .	3,—	1,—
„La kvar paĝoj de la mondo", de la samaj aŭtoro kaj tradukinto	2,—	1,—
La prezoj por la ceteraj eldonaĵoj restas neŝanĝitaj:		
„Freude durch Esperanto", lernlibro de Hugo Steiner		6,—
„Esperanto, Kurzer Lehrgang in 30 Lektionen"		3,50
„Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes" (Aŭstria Esp. Instituto) .		6,—
„Tabeloj por la intua instruado de Esperanto" de Fr. Mestan . .		1,50
„La mortado" de H. Nothnagel, tradukita de B. Selzer		2,—
„La malgranda helpanto", instru- kaj legolibreto el „Verda Biblioteko"		1,50

Ĉiu esperantisto aĉetu almenaŭ u n u libron por si aŭ eksterlanda amiko, por helpi per tio al la plua eldonado de Esperanto-libroj. Mendu rekte ĉe „Tramondo" aŭ per via Esperantogrupo!